



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

IM SOZIALWERK DER DEUTSCHEN BUNDESBahn

Numero 6 - Novembro/Decembro 1961

Pri nia laboro en Heidelberg

La kvina jarkunveno ne nur estis la plej brila manifestacio ĝis nun okazinta en la germana regiono de „Esperantujo fervojista“, sed ĝi ankaŭ donis valorajn rezultojn en siaj laborpartoj. Unu el la celoj de niaj jarkunvenoj ja estas, komune esplori la ĵusmomentan situacion en la rondo de la respondeculoj kaj prilabori la direktivojn por la venonta jaro. Alia celo estas, al kiel eble plej multaj neesperantistoj, al reprezentantoj de niaj administrejoj kaj deĵorejoj, al ĵurnalistoj kaj urbaj trafikistoj ktp. prui la taŭgecon kaj ekzistrajton de la Internacia Lingvo kaj ĝian valoron speciale por la trafiko kaj fervojo. Pro tio la programo kiel unuan punkton enhavis la jam tradician akcepton por ĵurnalistoj. Ĉeestis i. a. la reprezentantoj de la ĉefestraro de BSW Rummel, de la distriktestraro de BSW Karlsruhe BR Mettenleiter, de la gazetarservo BD Karlsruhe Ruppig, la distriktestro por la kulturaj aferoj Hill, la distriktkomisiito por Esperanto Hug, la prezidanto de IFEF de Jong kaj la prezidanto de GEFA Giesner. S-ro Mettenleiter menciis, ke la direkcia Giesner Karlsruhe daŭre devas interrilati kun alilingvaj najbaroj kaj substrekis, kiel alstrebinda estus la uzado de Esper-

anto kiel komuna interkomunikilo. Kvan- kam ĉeestis nur ĵurnalistoj de la lokaj gazetoj, ĉi tiu konferenceto tamen fariĝis la plej vigla kaj fruktodona diskutado inter ĵurnalistoj kaj esperantistoj, kiun ni ĝis nun aranĝis. Preskaŭ 3 horojn daŭris la argumentplena luktado inter ambaŭ flankoj. Ke niaj argumentoj ne estis vanaj, oni povis ekkoni el la pozitivaj raportoj en „Heidelberger Tageblatt“ kaj „Rhein-Neckar-Zeitung“. Precipe ĝojige estis, ke ĉiuj ĉeestantoj neesperantistaj partianiĝis por nia afero kaj eĉ liveris argumentojn, kvazaŭ ili mem estis esperantistoj. Vendredon vespere kunvenis la estraro de GEFA kun la komisiitoj por specialaj taskoj (redaktoro, kasisto ktp). Kiel gastoj partoprenis la kolegoj de Jong kaj Stapel el Amsterdam. Ĉi-loke eble interesas, ke i. a. estis preparolata la nekontentiga raportmaniero pri niaj internaciaj kongresoj pere de LIF. Evidentiĝis, ke eksterlandaj kolegoj informis sin pri la Barcelona-kongreso helpe de nia „Bulteno“, kiu ja nur prilumigas la kongreson tra „germanaj okuloj“, do ne komplete taŭgas por ĉiufanka kaj neutrala informado. Espereble la estraro internacia trovos solvon, por ke estontece „LIF“ vere informu la membraron



La nova afiŝo. Foto: Nora Hartwich, Frankfurt/M.



La Esperanto-flago flirtanta antaŭ la stacidomo de Heidelberg. Foto: W. Barnickel, Frankfurt/M.

pri ĉio necesa. Menciinde estas ankaŭ, ke la germana estraro decidis, subteni la „Internacia Arta Teatro“ unue per 50 GM. (La IAT estas nova, eminente grava institucio en la kultura agado de la Esperanto-movado).

Antaŭ ol ni daŭrigas nian raporton pri la labor-kunsidoj, ni nepre jetu kelkajn rigardojn al la organizado de la jarkunveno, kiu superis ĉiujn atendojn. Ankaŭ ĉi-loke la GEFA-estraro nome de ĉiuj partoprenintoj esprimas sian sinceran dankon al ĉiuj LKK-anoj, kiuj en longaj monatoj tiel bonege preparadis la jarkunvenon kaj aktive agadis ĝis la lasta minuto de ĝia daŭro. Ni same dankas al la BSW-estraro de la distrikto Karlsruhe pro la intensiva subteno, ĉar nur ĝi ebligis la brilan kunvenon. Oni ne rajtas ne mencii ĉi-loke la perfektecon de la preparlaboro. Ĉiu aliĝinto ricevis en la akceptejo koverton kun speciala slipo, klariganta la lokon de la hotelo kaj la manieron atingi ĝin. Ĝi estis stampita per **speciala stampo**. Oni krome trovis du belaspektajn **insignojn** — la unuan fojon en jarkunveno — kun argentkolora skribo sur malhelverda fundo. La koverto krome enhavis ĉiam bonvenan **urbo-planon** kaj tre belan **gvilibreton** ilustritan en esperanta lingvo. Ĝi eldoniĝos entute en kvanto de 500 ekzempleroj. Plia eldonaĵo de ĝi estas antaŭvidebla. Ni ne forgesu la varbbruŝuron „Heidelberger Bilderbuch“ de la firmo Hettlage, kiu en ĉarma maniero ligas interesajn sciigojn pri Heidelberg kun la varbado por la firmo. Tio estis plaĉa reklamo kontraste al la Pepsi-Cola-propagando en Barcelona. Laŭdaj vortoj ankaŭ necesas pri la **ornamentado** de la stacio kaj de la kunvenejo. Bonefike kaj ĉiuloke estis eluzitaj la

novaj afiŝoj de GEFA (vidu la frontpaĝan foton). Bone impresis la akceptejo apud la stacia informejo. **Larga bendo** kun la vortoj „Bonvenon Esperantistaj Fervojistoj“ bonvenigis la alvenantojn enmeze de la stacidomo, kaj flagoj flirtis antaŭ stacidomo kaj kunvenejo (vidu la fotojn). Ankaŭ laŭ la nombro de la aliĝintoj la 5a jarkunveno estis la ĝis nun plej impona. Aliĝis pli ol 150 personoj, inter ili 35 eksterlandanoj. La plej forta grupo venis el Belgio kun 21 personoj. Krome ĉeestis gastoj el Aŭstrio, Francio, Hispanio, Jugoslavio, Nederlando kaj Svislando.

La duan fojon ni okazigis **Esperanto-ekzamenon**. Kvankam nur kandidatiĝis 3 gekolegoj, kiuj cetere ĉiuj sukcesis, la ekzameno estis esenca parto de la jarkunveno. Prezidis en la komisiono nia konata s-ano Schönrich el Wiesbaden kaj asistis la unuan fojon nia kolegoj Jäger kaj Dr. Lang kiel novaj komisaraj. Jen la bazo por nia estonta propra ekzameno-komisiono. Bone vizitata (70 personoj) estis la buŝa parto de la ekzameno dimanĉon matene. Tre ĝojige, ke eĉ edzinoj interesiĝis pri la ŝvitado de la kandidatoj.

Sabaton posttagmeze kunsidis la GEFA-estraro kun la **16 distrikt-komisiitoj**. En ĝi estas traktitaj organizaj problemoj same kiel labormetodoj por la grupoj. Estis fiksita la venontjara kunvenloko, nome Münster (Westf.), kaj provizore por 1963 estas antaŭvidita München. Pri la terminaro oni decidis, ke devos esti trovataj vojoj por akceli la laboron kaj por faciligi al kol. Ritterspach la situacion ĉi-rilatan. Dum la sama tempo la plej granda parto de la kongresanoj partoprenis en omnibus-rondveturado.

La kulmino de la tuta jarkunveno sendube estis la **Esperanto-solenajo** sabaton vespere. En la salonego de Zieglerbräu kolektiĝis pli ol 200 personoj, inter ili ĝojige multe da eksterlandaj amikoj. Krome ĉeestis s-ro Gattun, kiu anstataŭis la malhelpitajn s-rojn Mettenleiter kaj Hill (BSW distriktestraro), s-ro Behrens (personara reprezentantaro de la direkcio), s-ro Nischwitz, la vicprezidanto de la Germana Esperanto Asocio kaj ties redaktoro, s-ro Reuchlin.

Malfermis la solenajon la distrikta komisiito de Karlsruhe, s-ano Hug. Li esprimis la perletere senditajn salutojn de la prezidanto de la fervoja direkcio Karlsruhe, **s-ro inĝeniero Günther** kaj la skribajn salutojn de diversaj amikoj ekster-kaj enlandaj. Poste la prezidanto de GEFA, **s-ro Giessner**, laŭtlegis la jarraporton, kiun vi trovas aparte en ĉi tiu Bulteno. Antaŭe li sciigis, ke en la pasinta jaro tri kolegoj devis forlasi nin pro morto, nome la germanoj BDir. Schuchmann kaj BAmtm Staub kaj la konata kaj ŝatata finna kolego Ruhanainen. Starante ĉiuj ĉeestantoj honoris la forpasintojn.

Post la jarraporto parolis la reprezentantoj de la fervojo kaj de la personaro, s-roj **Gattun** kaj

Behrens. Kol. de Jong, prezidanto de IFEF, akcentis, ke li volonte ĉestas kaj ĉestos en la GEFA-jarkunveno.

Li petis daŭrigi la manieron de nia laboro, ĉar ĝi altigas la nivelon de GEFA kaj same de IFEF. Kol. **Hermann** (Aŭstrio) i. a. deziris al la aŭstra asocio samajn progresojn kiel GEFA povis atingi. Kol. **de Bruyne** (Belgio) faris la ĝojigan sciigon, ke la belga asocio akiris la oficialan permeson de la fervoja administrado, elpendigi la de GEFA liveritajn novajn afiŝojn en tuta Belgio. Gratulon al niaj belgaj amikoj! S-ino **Lacombe** per korduŝaj vortoj salutis nome de la franca asocio. Kol. **Greutert** (Svisio) same ĝojis pri la senditaj afiŝoj kaj donacis esperantlingvan kolorkalendaron eksterordinare belan al la GEFA-prezidanto, kiu elkore dankante akceptis ĝin en la nomo de ĉiuj helpantoj. Krome salutis la s-anoj **Berniol** (Hispanio) kaj **Ŝponar** (Jugoslavio). Ankaŭ s-ano **Nischwitz** (Vicprezidanto de GEA) laŭdis la senlacan kaj efikan laboron de GEFA (vidu la guston). Speciale lerte kaj belsone s-ino

Ritterspach plibeligis la vesperon per ludaĵoj sur piano, akompanante sian edzon kaj prezentante kun li „Poezian Mozaikon“ tre plaĉe elektitan. Per la himno finiĝis la Esperanto-solenajo. En la posta distra vespero kunagis Lilo Müller, Ludwig Treiber kaj Werner Kapferer, kiuj per belega muziko (gitaro, akordeono kaj elektra orgeno), per gajaj kantoj kaj viglaj dancoj plezurigis la ĉeestantojn. Dankon ankaŭ al ili.

Dimanĉon matene oni kolektigis en „Amerika-Haus“ por vidi filmojn. Precipe menciinda estas la prezentado de esperantlingva sonfilmo, farita flanke de la franca postministerio (specialan laŭdon al la francoj samideanaj kiuj sukcesis ĝin inspiri) kaj provizore sinkronizita dokumentarfilmo de la DB „De 0 ĝis la 24a horo“, kiun laboregon ankaŭ faris nia kolego **Ritterspach**.

Post komuna tagmanĝo en la kunvenejo **Zieglerbräu** ĉiuj hejmenveturis post agrablaj horoj kun amikoj kaj kun freŝaj fortoj en la korjoj. Ek al nova laboro! (Giessner)

„Sed ne forgesu kunporti iom da sunbrilo!“

Kiu atente legis la antaŭan bultenon, tiu rememoros, ke la ĉi-supra frazeto troviĝas kiel la lasta en la frontartikolo pri Heidelberg. Nu, kolego **Ritterspach**, aŭtoro de la artikolo kaj „Esperanta motoro“ dum la 5a jarkunveno de GEFA, ĉu vi devas plendi? — Vere, oni ne forgesis kunporti . . .

Dum ĉiuj kunvenantoj en Heidelberg la aŭfuna suno varme kaj ĝojige brilaradis de sur la sennuba blua ĉielo. Precize dirite, ĉielo ne tute sennuba, se oni opinias aviadilajn kondensstriojn nuboj. Estus estinte ne malagrabla, se la aviadistoj estus skribintaj sur la ĉielan volbon la salutvorton „Esperanto“. Nu, oni ne postulu de aliaj tro multe da komprenemo pri nia afero.

Kiel kutime, ankaŭ la ĉi-jara GEFA-kunveno havis sian gazetarkonferencon. Ekstis granda argumentbatalo kun la ne-Esperantistaj ĵurnalistoj. Tamen ili fine skribis favorajn artikolojn sub la titoloj „Ĉu Esperanto estas mortinta?“ kaj „Lingvo sen limoj — Esperanto“. La kontakto kun la gazetaro estas sendube unu el la plej gravaj aferoj, por klarigi al la publiko la signifon de la strebado Esperantista. Per tio, paŝon post paŝo, la vorto Esperanto enpenetras en la ĝeneralan nacian vorttrezoron — ne sub tiu konfuza koncepto, sed sub la ĝusta nocio de praktika internacia pontlingvo, kiel pravas la fakto, ke antaŭ nelonge, dum televida prezentado de la hodiaŭa vivo de germanoj en Orienta Afriko, la raportanto menciis, ke la lingvo „Kisuaheji“ estas por la diverslingvaj triboj la „Esperanto de Orienta Afriko“.

Se vi demandas, ĉu la loka komitato, respondecas per la aranĝado de la jarkunveno, sukcesis doni al la afero okulfrapan kaj konvenan eksteran aspekton, oni devas konfesi, ke la komitato plene sukcesis kaj pro tio meritas malavaran laŭdon.

Kiu estis forlasanta la regionon de la kajoj de la nova stacidomo de Heidelberg, ties okuloj estis agrable trafitaj de florornamitaj tabuloj kun la nova varbafiŝo de GEFA — cetero bone uzebla ankaŭ por la celoj de la fratag fakorganizoj eksterlandaj kaj salutata de ili kun laŭdo. Dankon al nia kolego **Barnickel**, ĉar estas lia iniciativo, kiu havigis al ni la afiŝon!

Nonvenon Esperantistaj Fervojistoj! — jen la inkskribo de grandmaterna blanka afiŝbendo, kiu salutis la kolegojn, alvenintajn multnombro el ĉiuj anguloj de la okcidentgermana relaro kaj eĉ el tiu de la najbara eksterlando. Iomete rondrigardante en la stacidoma antaŭhalo, oni tuj estis

altirata de stranga objekto: mezgranda verda piramido kun la novaj afiŝoj starigita en la proksimeco de la monŝanĝejo. Super la pordo pendis Esperanto-flageto: efektive, jen la akceptejo por la partoprenantoj de la jarkunveno! —

Speciale salutinde estas, ke la kutima kunvenmaterio enhavis je la unua fojo apartan verdan insignon, kiu estis dum la kunvenantoj okulfrapa ekkonilo kaj interligilo kaj kiu bone servos al ĉiuj kiel memoraĵo.

Antaŭ la stacidomo salutflirtis de sur altaj mastoj kvin flagoj: du nigraj-flavaj de la urbo Heidelberg, du nigraj-ruĝaj-oraj de la Germana Federacia Respubliko kaj enmeze de ili la verda Esperanto-flago kun la verda kvinpinta stelo sur blanka fono. Longa verdajstrio kun fontanoj — en la fono la verdaj deklivoj de la Neckar-rivervalo — kondukis al la centro de la urbo, kie troviĝis la kunvenejo „Zieglerbräu“ (restoracio de la bierfarejo Ziegler). Jen la loko de la komunaj laboro, distro kaj mangado, sufiĉe digna laŭ grandeco kaj interna aspekto, ekstere ornamita per Esperanto-flago kaj per la novaj afiŝoj!

Precipe salutinde estas, ke la Esperanto-eldonejo **Limburg/Lahn** sub la gvido de s-ro **Städt** starigis siajn tendojn en la kunvenejo kun stoko da libroj kaj aliaj Esperanto-presajoj. S-ro **Städt** estis sufiĉe kontenta pri la aĉetpreco de la fervojistaj samideanoj, kiel li certigis. Nu, venontjare en **Münster** (Westf.) li honoru denove nian jarkunvenon per sia vizito!

Belaspekta ilustrita prospekto esperantlingva pri Heidelberg, trovebla inter la kunvenmaterio, asertis, ke Heidelberg estas romantika urbo kaj urbo de Romantiko. Perbusa veturado laŭlonge de la idilia rivervalo kun siaj krutaj verdaj deklivoj ambaŭflanke, vizito al la mondfama diversstila kastelo, vizito al la malnova studenta karcerco de la universitato kaj al la universitata biblioteko peris la impreson, ke la prospekto ne troigis. Kiu ne konas la studentan kanton „En Heidelberg mi perdis mian koron“? Vere, la korto de la kastelo ĉiam estis kaj estas la renkontiĝejo de vizitantoj el la tuta mondo! De sur la kastela teraso aŭ de sur la turo de la preĝejo „Sankta Spirito“ neforgesbla panoramo de beleco sin prezentas al la „romantika“ okulo. — Estas rekomendinde, ankoraŭfoje tralegi la frontartikolon de la antaŭa bulteno, por scii pli pri la valoro de Heidelberg por la serĉanto de alta homa kulturo.

Ci-supre oni povis legi, ke kolego **Ritterspach** estis nomita

„Esperanta motoro“ de la jarkunveno. Kiu travivis, kiel lerte kaj sperte li sciis manipuli, esperantlingve per la aŭtobusa mikrofono, la rondveturado kaj, per megafono en la mano, la viziton al la kastelo kaj la aliaj vidindaĵoj lokoj, tiu volonte konfesos, ke la predikato donita al li estas ĝusta. Dum la solena vespero li kaj lia same fervora, ĉiam afable ridetanta edzino pruvis la ĝustecon de tiu predikato denove, kiam ili komune prezentis anstataŭ la festparolado sian „Poezia Mozaiko“. Alterne ili deklamis, parte esperant-, parte germanlingve, zorge elektitajn pecojn el la verkaro de romantikaj poetoj kun rilato al Heidelberg, pri kiu la franca aŭtoro Edgar Quint iam skribis: „Jen Heidelberg, ĝi estas la hejmo de la animo!“. Ili citis Hölderlin, Keller, Heine, Goethe, Brentano kaj Eichendorff. La diversajn citaĵojn enkadrigis kaj interligis muzikpecoj de romantikaj komponistoj kiel Beethoven, Schumann, Schubert kaj Weber, fortepiane prezentitaj de s-ino Ritterspach kunvere profesia majstreco. La aŭskultantaro pruvis kulturalan komprenemon kaj dankis per granda aplaŭdo, GEFA per transdono de belega florbukedo. — La solenan parton fermis la Esperanta himno.

La salono estis ornamita per la nove akiritaj granda Esperanto-flago sur la frontmuro. Antaŭ ĝi staris du grandegaĵoj vazo kun floroj. La podio estis ekipita per pupitro kaj mikrofono. La aplikado de la mikrofono sin pruvis tre taŭga. Oni zorgu, ke tiaj teknikaj rimedoj neniam manku dum niaj plej gravaj aranĝoj!

La distra parto de la vespero ĉifoje ne antaŭvidis komunan dancadon. Anstataŭe oni prezentis specialan programon de tri profesiaj amuzistoj: kantanta kaj gitarludanta anoncisto, kiu nin ĝojigis per humuraj frazetoj kaj per modkantoj, krome gracia, ĉarma baletistino, kiu sin prezentis en kostumoj de japana geŝo, ĵokeo kaj adiaŭtanta gvardia oficio kaj fine muzikvirtuozo, kiu aŭdigiis ravajn ritmojn kaj melodiojn per akordeono kaj elektrona orgeno. Granda aplaŭdo kaj transdono de florbukedo dankis la artistojn pro la agrabla amuzo kaj distra horeto. — Jen la momento, ek de kiu ĉiu

povis serĉi en Heidelberg sian distron laŭ propra plaĉo kune kun siaj germanaj kaj eksterlandaj geamikoj.

La jarkunveno finiĝis post plenumado de jenaj tri punktoj: matena buŝa ekzameno publika, antaŭtagmeza filmprezentado en la Amerika Domo kaj komuna tagmango en la kunvenejo.

Bedaŭrinde partoprenis en la ekzameno ĉifoje nur tri kandidatoj. Estus nepre dezirinde, se ĉiuj membroj de GEFA, unu post la alia, farus la kuraĝan decidon, havigi al si la diplomon pri lingva kapableco. Iam tiam, provi sin bonŝancon, estas tute senkaŭza. Kiel la komisionestro s-ro Schönrich, Wiesbaden, klarigis kaj kiel ĉiu el la aŭskultantoj povis observi, la ekzamenpostuloj por la unua ekzamengrado ne estas kaj ne rajtas esti tro severaj. Do, ni esperu, venontjare renkontiĝi kun pli da kuraĝuloj! Cetere, ne forgesu alian gravan punkton de via agado, kiu jam prave denove esprimis la GEFA-prezidanto s-ro Giessner: „Ĉiu nepre varbu minimume unu membron pojar!“.

Ne estas mirige, ke ni dum la filmprezentado denove renkontis nian „Esperantan motoron“. Li prezentis belegajn koloradiazitaĵojn pri Heidelberg kaj la antaŭaj kongreslandoj Finnlando kaj Hispanio kun klarigoj en Esperanto. Esperantlingva filmo de la franca Poŝtministerio kun bona prezentado de la lingvo instruis pri la multflanka laborvivo de la poŝto. De nia „motoro“ sinkronizita filmo de la Germana Fervojo permesis rigardon en la ekeston kaj la precizecon de la plenumado de la horaro. Desegnitaj humura filmeto, en kiu rolis la fervojo kaj la animaloj de zoologia ĝardeno, finis la sukcesplanan instruon kaj distran filmmatenon.

Resume: la 5a jarkunveno estis granda sukceso rilate al ĉiuj programpunktoj kaj laŭ la ekstera okulfrapa „verda“ aspekto. La kunveno estis ja germana, tamen fariĝis internacia pro la dankinda ĉeesto de multaj eksterlandaj geamikoj. Do, viziti Heidelberg okaze de la jarkunveno de GEFA, signifis, viziti veran parton de la mond vasta Esperantujo!

G. Korth

Jahrestreffen in Heidelberg

(Kurzer Auszug aus vorstehenden Esperanto-Berichten)

Die Mitglieder der „Vereinigung der Deutschen Eisenbahner-Esperantisten“ im Sozialwerk der Deutschen Bundesbahn trafen sich am 13./15. Oktober 1961 in Heidelberg im „Zieglerbräu“ zu ihrer 5. Jahresversammlung. Über 150 Eisenbahner, darunter 35 ausländische Gäste aus Österreich, Frankreich, Spanien, Jugoslawien, den Niederlanden und der Schweiz, nahmen an dem Treffen teil. Die an sich deutsche Veranstaltung erhielt durch den erfreulich starken Besuch aus dem Ausland internationalen Charakter, so daß die neutrale Brückensprache Esperanto ihre Vermittlerrolle übernehmen und ihren praktischen Wert erweisen konnte.

Ziel der Vereinigung ist es u. a., die Vertreter der eigenen Eisenbahnverwaltung und die Öffentlichkeit von dem geld- und zeitsparenden Nutzen der Anwendung von Esperanto im internationalen Verkehr zu überzeugen, ein Ziel, das in gleicher Weise die entsprechenden Vereinigungen der ausländischen Kollegen verfolgen. Die Jahreshauptversammlung wurde daher wieder mit einem Presse-Empfang eingeleitet, zu dem Journalisten der „Rhein-Neckar-Zeitung“ und des „Heidelberger Tageblattes“ erschienen waren.

In dreistündigem Gespräch wurden die Probleme der internationalen Verkehrsbeziehungen hinsichtlich der Sprachschwierigkeiten und ihrer praktischen Lösung durch Esperanto diskutiert. An dem Gespräch nahmen teil: für den Hauptvorstand des BSW Frankfurt a. M. Herr Rummel, für den Bezirksvorstand des BSW Karlsruhe Herr BR Mettenleiter, für den Pressedienst der BD Karlsruhe Herr Ruppig, ferner der Bezirksleiter für kulturelle Angelegenheiten, Herr Hill, der Bezirksbeauftragte für Esperanto, Herr Hug, und schließlich der Vorsitzende des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten, Herr de Jong, Amsterdam, sowie der Vorsitzende der Vereinigung der deutschen Eisenbahner-Esperantisten, Herr Giessner, Elze (Han). Unter der Überschrift „Ist Esperanto tot? — Eisenbahner-Esperantisten tagen in Heidelberg“ und „Sprache ohne Grenzen — Esperanto. 5. Jahresversammlung der Eisenbahner-Esperantisten“ unterrichteten die Journalisten die Öffentlichkeit über die internationale Sprache Esperanto und die Bestrebungen der Eisenbahner-Esperantisten. Als Beispiel seien hier die einleitenden Worte zu dem erstgenannten Artikel angeführt: „Weder

die englische noch die russische noch die französische Sprache könnten, zumal in dieser Zeit erwachender Nationen, Weltsprache werden — mit dieser Feststellung beantworteten gestern Esperantisten die Frage nach der Berechtigung ihrer ‚Welthochsprache‘. Dieser gewiß einleuchtende Hinweis wurde bei einer Pressekonferenz gegeben, mit der die fünfte Jahresversammlung der Vereinigung der Deutschen Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk eröffnet worden ist.“

In mehrstündigen Sitzungen erarbeitete der geschäftsführende Vorstand mit seinen Sonderbeauftragten und mit den 16 Bezirksbeauftragten für das Esperantowesen die Richtlinien für das nächste Jahr. An den Sitzungen nahmen für den Hauptvorstand des BSW Herr Rummel teil, ferner Herr de Jong, Vorsitzender des Internationalen Verbandes in Amsterdam, und Herr Stapel, Ehrenvorsitzender dieses Verbandes. Der Bericht über die Arbeit des abgelaufenen Jahres wurde im Rahmen einer Feierstunde am Samstagabend vom Vorsitzenden in Esperanto verlesen (siehe den nachfolgenden deutschen Auszug).

An der Feierstunde nahmen etwa 200 Personen teil, unter ihnen Herr Gattun für den dienstlich verhinderten Herrn Mettenleitner, Herr Behrens als Vertreter des Personalrates der BD Karlsruhe, ferner Herr Nischwitz, Vizepräsident des Deutschen Esperanto-Bundes, und Herr Reuchlin, Redakteur dieses Bundes. Herr Hug, Beauftragter für das Esperantowesen im Bezirk Karlsruhe, eröffnete die Feierstunde und übermittelte die brieflichen Grußworte des dienstlich verhinderten Präsidenten der BD Karlsruhe, Herrn Ing. Günthert, und die einiger aus- und inländischer Kollegen. Ferner richteten herzliche Grußworte an die Versammlung die Herren Gattun, Behrens und Nischwitz sowie die Herren de Jong (Holland) für den Internationalen Verband, Herrmann (Österreich), de Bruyne (Belgien), Greutert (Schweiz) und Frau Lacombe (Frankreich) für ihre Landes-Vereinigungen. Als Nicht-Eisenbahner überbrachten Grüße aus Spanien Herr Berniol und aus Jugoslawien Herr Sponar. Die verstorbenen Kollegen BDir Schuchmann und BAtm Staub sowie der finnische Kollege Ruhana inen wurden mit einem Augenblick des Schweigens geehrt. —

Anstelle einer Festrede trugen Herr BI Ritterspach, Heidelberg, und Gattin ihr „Poetisches Mosaik“ vor. Abwechselnd zitierten sie teils in Esperanto, teils in Deutsch aus den Werken romantischer Dichter, die mit Heidelberg Beziehung hatten. Frau Ritterspach umrahmte die Zitate mit dem Vortrag von Musikstücken romantischer Komponisten am Flügel. Die Feierstunde wurde mit der Esperanto-Hymne „Die Hoffnung“ beschlossen. Anschließend sorgten



Salutbendo en la stacidomo de Heidelberg
Foto: W. Barnickel, Frankfurt/M.

3 Berufsunterhalter mit Gitarre, Elektronenorgel, Tanz und Gesang für Zerstreuung.

Mit den Sehenswürdigkeiten von Heidelberg machten Omnibusrundfahrten bekannt. U. a. wurden das Schloß, der Studentenkarzer und die Universitätsbibliothek besucht. Kollege Ritterspach, der am Mikrophon im Bus oder mit dem Megaphon in der Hand in fließendem Esperanto die Erklärungen gab, verdient hier besonderes Lob.

Das Deutsche Esperanto-Institut hielt, wie im vorigen Jahr in Trier, eine Esperanto-Prüfung ab. Prüfungsleiter war Herr Lehrer i. R. Schönrich, Wiesbaden; als Prüfungskommissare amtierten erstmals die Kollegen Herr BAtm Dr. Lang und Herr BAtm Jäger aus Frankfurt a. M. An der öffentlichen mündlichen Prüfung im „Amerika-Haus“ nahmen etwa 70 Personen als Zuhörer teil. Alle Kandidaten hatten Erfolg.

Den Abschluß der Jahresversammlung bildete am Sonntagvormittag eine Filmvorführung im „Amerika-Haus“ und ein gemeinsames Mittagessen im „Zieglerbräu“. Herr Ritterspach zeigte Farbdias mit Motiven aus Heidelberg sowie aus Finnland und Spanien, Länder, in denen im vorigen bzw. in diesem Jahr der Internationale Verband der Eisenbahner-Esperantisten Kongresse abhielt. Ein vom französischen Postministerium hergestellter Tonfilm in Esperanto vermittelte einen interessanten Einblick in das Arbeitsgebiet der Post. Ferner wurden der Dokumentarfilm der DB „Von 0 bis 24 Uhr“ und ein heiterer Zeichentrickfilm gezeigt. Der Dokumentarfilm war von Herrn Ritterspach provisorisch in Esperanto synchronisiert worden.

Der Esperanto-Verlag Limburg/Lahn war bei

der Versammlung mit einem Bücherstand vertreten. Die in- und ausländischen Kollegen benutzten gern die günstige Gelegenheit, sich mit Esperanto-Literatur aus aller Welt zu versorgen.

Über allen Veranstaltungen stand ein strahlend blauer Herbsthimmel. Vor dem neuen Hauptbahnhofsgebäude flatterte inmitten von 2 Bundesflaggen und 2 Stadtflaggen die grüne Esperantoflagge. In der Bahnhofshalle grüßte ein großes Spruchband in Esperanto zum Willkommen. Eine grüne Pyramide und eine kleine Esperanto-Flagge

zeigten an, wo sich der Empfangsraum befand. Weitgehend wurde auch von einem neuen Werbeplakat Gebrauch gemacht, um den Weg zu weisen und das Versammlungslokal „Zieglerrbräu“ zu dekorieren. Die Organisatoren im BD-Bezirk Karlsruhe verdienen höchstes Lob für die Aufmerksamkeit, die sie dem äußeren Rahmen schenkten. Die 5. Jahresversammlung in Heidelberg kann als die bisher gelungenste angesehen werden. — Als Tagungsort für die 6. Jahresversammlung im Oktober 1962 ist Münster i. Westf. vorgesehen. Ko.

Jarraporto

laŭlegita de la prezidanto

Proksimume duona jardeko pasis, de kiam penetris en niajn cerbojn la idio, okazigi specialan renkontiĝon de GEFA-anoj el la tuta teritorio de la Germana Federacia Fervojo. Kelkaj el vi ĉeestis, kiam ni kunvenis la unuan fojon en Fulda, por flegi la rilatojn inter la kolegoj samideanaj, por komune esplori la situacion de nia asocio, por serĉi vojojn, kiamaniere antaŭenpuŝi ĝin, por doni instigojn kaj impulsojn al la membraro kaj speciale al la lokaj kaj distriktaĵ gvidantoj. Ĉi-loke mi devas memoriĝi vin je la fakto, ke en la IFEF-kongresoj de Utrecht, Verona, Zürich, Stockholm kaj Rijeka ĉiam pli kaj pli evidentiĝis, ke la anoj de la relative forta germana grupo grandparte ne konis unuj la aliajn. Kaj dum ĉiu kongreso oni petis de multaj flankoj aranĝi specialan kunveneton de la germanoj. Dufoje ni faris tion, sed ekestis vico da malkonvenaĵoj. Krome oni povas imagi, ke precipe al la delegitoj dum kongreso mankas la tempo por prepari kaj partopreni specialkunsidon. Pro tio ni rezignis post tiuj spertoj kaj anstataŭis la specialkunsidojn per ĝenerala kunveno de GEFA en oktobro 1957. La favora ĉo pravigis nian decidon. Regule ni daŭrigis la novan kutimon en la postaj jaroj en formo de „jarkunvenoj“, kiuj okazis en Fulda, Nürnberg, Dortmund, Trier kaj nun en Heidelberg. Kun ĝojo ni povas konstati, ke la nivelo de tiuj aranĝoj pli kaj pli altiĝis kaj ke la partoprenantoj pli kaj pli internaciĝis. Jam en Nürnberg antaŭ tri jaroj ĉeestis la unuaj gastoj eksterlandaj, sed lastjare same kiel ĉi-foje ni povis kaj povas saluti en nia rondo karajn amikojn el pluraj najbaraj IFEF-asocioj, ja eĉ anojn el la IFEF-estraro. Tio ne estas por ni kauzo je fiero, sed daŭra instigo al serioza traktado de niaĵ aferoj.

Serioza laboro sendube estas la plej valora kaj efika armilo por ni esperantistoj. Kaj ĉi-okaze mi deziras esprimi mian sinceran dankon al ĉiuj helpantoj inter vi kaj inter la tuta membraro, kiuj bonkore, laboreme kaj celtrafe agis dum la pasintaj jaroj, por progresigi nian asocion. Mi

rajtas uzi la vorton „progresigi“, kvankam ni ne povas konstati kreskon de la membronombro. Tio dependis de iom trarapida membrigo de novaj kursanoj, precipe en unu distrikto dum la antaŭa jaro, tiel ke nunjare sekvis diversaj ekziĝoj, kiujn la kresko en aliaj distriktoj nur povis egaligi. El tio oni ankaŭ ekkonas, ke nur relative malmultaj membroj aktive partoprenas en la verbado. Sed ĵus en tiu laŭŝajne negativa fakto kuŝas vastaj rezervo por la pligrandigo de nia asocio kaj por la Esperantoafero entute. Multe pli ol ĝis nun ni eluzu la personajn kontaktojn al amikoj, parencoj, konatoj. Ni konvinku ilin pri la avantaĝoj de Esperanto. Tute certe estas eble, ke **ĉiu membro minimume unu personon** dum la tuta jaro altiras al nia organizaĵo. Tiu ideo estu kaj restu **nia ĝenerala direktivo**.

Mi menciis la seriozecon de nia laboro. Permesu, ke laŭ la kutimo en la pasintaj jarraportoj mi konatigas al vi la plej gravajn detalojn el niaĵ lastjaraj klopodoj. Granda paŝo antaŭen estas la **pli granda amplekso de nia germana Bulteno**. Dum ĝi aperis ĝis 1959 poĵare sesoble kun 4 paĝoj, do entute 24 paĝoj, tiu ĉi nombro kreskis al 32 en 1960 kaj ekde la kuranta jaro ni havigis la konsenton de BSW, aperigi la Bultenon kun entute 42 paĝoj inkluzive la dupaĝa aliĝilo por la jarkunveno. La tuta amplekso do kreskis je 75% dum nur 2 jaroj. Pro tio la ĉefestraro de BSW meritas nian sinceran dankon. Eble kelkaj el vi rimarkis, ke tamen ĉi-jare ĝis nun nur aperis 24 paĝoj. La kaŭzo estas, ke ni planas aperigi okpaĝan specialan numeron ilustritan, kiu enhavos superrigardon pri la historio kaj evoluo de nia germana asocio. Post la lastjara peto niaflanka kelkaj kolegoj, eĉ el Mezgermanio, disponigis al ni tre interesan materialon. Kvankam tio denove signifos grandan laboron, ni esperas, ke ni povos komili kaj publikigi ĉion tion ĝis jarfino.

Same kun plena subteno de BSW ni povis eldoni novan **plurkoloran varbafiŝon** sen nacia teksto, nur kun la vorto „Esperanto“. Vi povis vidi ĝin jam en la stacia halo kaj ankaŭ ĉi tien en la

salono. Ĝi jam trovis la agnoskon de kelkaj aliaj landaj asocioj, kiuj petis alsendon de centoj da tiaj afiŝoj por eluzi ilin por anonci siajn varbaranĝojn. Ni estas tre kontentaj, ke ni tiamaniere povas helpi al niaj eksterlandaj amikoj. Kompreneble la afiŝo nur povas servi por la preparo de fervojistaj kunvenoj, ĉar sur ĝi estas videbla moderna motorvagono. Plia kaj tre okulfrapa novaĵo estas la nova granda flago de GEFA, videbla antaŭ vi sur la scenajo. Tiamaniere en la estonteco estos eble, dece ornami la kunvenejoj de nia asocio. La bela emblemo de la germanaj esperantistoj fervojistaj sur la verda drapo de nia flago ek de hodiaŭ akompanos nin sur la dorncplena vojo al realigo de niaj ideoj kaj pensoj. Nia deziro estas, ke tiu vojo kondukfu ne nur al la plenumo de niaj fakaj celoj, sed finfine al libera kaj paca interkontaktiĝo kaj interkompreniĝo de la homoj helpe de nia lingvo.

Ĝis nun ne eldonita, tamen en preparo, estas nova **faldprospekto** pri la germana fervojo kaj la belajoj de Germanio. Verŝajne ĝi iom similos al tiu, kiu ekzistis antaŭ kelkaj jaroj sub la titolo „Vizitu Germanion“. Antaŭvideble ĝi eldoniĝos en kvanto de 20000 ekzempleroj.

Same en preparo estas projekto, kies realigon ni jam delonge alstrebas. Du pliaj kolegoj sukcesis en la kursgvidanta ekzameno. Pro tio ni nun fidoplene rajtas atendi la starigon de propra **ekzameno-komisiono de GEFA**, kiu en la nomo de la Germana Esperano-Instituto okazigos la lingvo-ekzamenojn en niaj jarkunvenoj kaj laŭbezone ankaŭ aliloke.

Ni ne forgesu ĉi-loke mencii, ke ankaŭ en la UEA-jarlibro de 1961 ree troviĝas **tutpaĝa anonco** de la Germana Federacia Fervojo, kiu varbas por la uzado de la fervojo, substrekante ĝiajn elstarajn ecojn nome sekureco, rapideco kaj komforto. Oni ne dubu pri tio, ke ankaŭ la aperigo de tia anonco nur estas la frukto de daŭraj klopodadoj de nur malmultaj viglaj kolegoj.

Ankaŭ la jam mondvasle konata Esperanto-Filmo-Germanujo ne dormis. Ĝi eldonis sian kvaran diskon, produktitan ĉe Philips. Ĉi tiu disko aŭdigas „memoraĵojn je Bruselo“, t. e. prezentajojn el la Universala Kongreso en Bruselo. Ĉi enhavas konatajn melodiojn el la operetoj „valsrevado“ kaj „la gaja vidvino“ same kiel la italan kanteton „Tik-e-tik-e-tok“ kaj la ŝatan sudafrikan „Sari Marejs“. La esperantistaro vere ŝuldas dankon kaj laŭdon al la senlaca, riskoplena kaj sindona laborado de tiuj malmultaj germanaj fervojistoj. La diskoj estas haveblaj ĉe la Limburger Vereinsdruckerei aŭ rekte ĉe kolego Biernath en Braunschweig.

Fine mi tuŝu la **terminaran laboron**, en kiu la germana asocio grandstile kunlaboradas. Ĉi tie ne estas la loko priskribi la longjaran penadon de la kolegoj, kiuj okupas sin pri la afero. Sufiĉas diri, ke ili ĉiuj honorofice, libertempe kaj liber-



La vicprezidanto de Germana Esperanto-Asocio salutas la samideanojn de la fervojo. Foto: Nora Hartwich, Frankfurt/M.

vole faras multe pli ol sian devon, kaj oni nur povas deziri, ke ili finfine sukcesos venki la sennombrajn obstaklojn ankoraŭ troviĝantajn antaŭ la celo. Estas klare, ke la fervoja terminaro, kies vortrezoro adaptiĝas al tiu de la konata UIC-vortaro, estos nepre necesa por kontentiga uzado de la Internacia Lingvo en fakaj medioj fervojaj.

Jen, estimataj gekolegoj, konciza resumo de nia agado. Mi nepre aldonu, ke kompreneble nur temis pri la centrala agado, kiu koncernas kvazaŭ la asocion entute. Same sindoneme laboris certa nombro de lokaj kaj distriktaĵ gvidantoj kaj unuopaj membroj. Varbaranĝoj, prelegoj, kursoj, ekspozicioj ktp. ja nur povas esti aranĝataj, se aktivaj membroj estas pretaj fari iom pli ol nur pagi kotizon. Estas malfacile trovi tiajn homojn en la nuntempa mondo, kie ĉefe valoras eksterajoj kaj kie estas multe pli grave — kaj facile — ensuci tielnomatan saĝecon helpe de kinejo, televido aŭ ilustritaj revuoj anstataŭ iri la pli penigan, sed despli kontentigan vojon, nome formi la propran opinion el propraj spertoj. Nia okupado pri Esperanto estas sendube metodo, havigi al si kontaktojn kaj spertojn ne atingeblajn al personoj, kiuj neas tiajn „absurdaĵojn“ kiel estas en iliaj okuloj la studado de „artefarita“ lingvo. Mia deziro estas, ke la hodiaŭa jarkunveno donos al vi ĉiuj, karaj amikoj, novajn fortojn kaj la certan scion, ke vi elektis bonan kaj ĝustan vojon lernante kaj uzante la internacian lingvon Esperanto.

(Gießner)

Jahresbericht des Vorsitzenden

(verlesen auf der 5. Jahresversammlung der Deutschen Eisenbahner-Esperantisten in Heidelberg am 13./15. 10. 1961)

Auszug aus vorstehendem Esperanto-Bericht

Wir feierten gewissermaßen ein kleines Jubiläum mit der 5. Jahresversammlung. Das Niveau dieser Veranstaltungen stieg laufend, und besonders erfreulich ist die sich seit Jahren steigende Teilnahme ausländischer Freunde. Aus der Arbeit des vergangenen Jahres wäre im wesentlichen folgendes herauszugreifen:

Der Umfang unseres Mitteilungsblattes „**Bul-teno**“ stieg dank der großzügigen Hilfe des BSW (Hauptvorstand) von 24 Seiten jährlich (bis 1959) auf 32 Seiten (1960) und nun im Jahre 1961 auf 42 Seiten. Für Ende 1961 ist eine Sondernummer geplant, die einen Rückblick auf die bisherige Entwicklung der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten geben soll.

Weiter konnten wir, ebenfalls mit Hilfe des Hauptvorstandes, ein mehrfarbiges **Werbeplakat** ohne nationalsprachigen Text herausbringen, was infolgedessen in allen Ländern verwendbar ist und von unseren Freunden im Ausland allenthalben lebhaft und dankbar begrüßt wird. Es wurde z. B. im gesamten Gebiet der belgischen Staatsbahnen zum Aushang am „Schwarzen Brett“ zugelassen.

Internacia Arta Teatro

La GEFA-estraro varme rekomendas al la tuta membraro, subteni la „Internacian Artan Teatron“ per financa helpo, kiu povas esti la valoro de 1 dolaro poĵare por „Amiko“, 2 dolaroj por „Amiko-Subtenanto“ kaj lo dolaroj por „Amiko-Mecenato“. Komparu aldonajon en la revuo „Esperanto“ de julio 1961. La monon oni sendu al la ĉefdelegito de UEA por Germanio, s-ro Karl Helfers, postĉekkonto 24506 Karlsruhe, favore al Srdjan Flego, Internacia Arta Teatro. Kvitancoj estos donataj en la revuo „Esperanto“.

Der GEFA-Vorstand empfiehlt allen Mitgliedern wärmstens, das „Inter-

ationale Kunst-Theater“ finanziell zu unterstützen. Die Spenden werden erbeten in Höhe des Gegenwertes von jährlich 1 Dollar (Freund), 2 Dollar (Freund u. Förderer) oder 10 Dollar (Mäzen) (vergl. Beilage in der Revue „Esperanto“ vom Juli 1961). Das Geld wäre an den UEA-Delegierten Karl Helfers, Karlsruhe, Postscheckkonto 24505 zugunsten Srdjan Flego, Internacia Arta Teatro zu senden.

„Die Spender werden mit ihren Beiträgen in der Revue „Esperanto“ bekanntgegeben.“

Ekzameno

En la kadro de la 5a jarkunveno de „Germana Esperanta Fervojista Asocio“

Eine neue große **Verbandsflagge** wurde beschafft, die künftig unsere Versammlungsräume schmücken wird.

In Vorbereitung ist ein neuer esperantosprachiger **Faltprospekt** der Deutschen Bundesbahn in Auflagenhöhe von 20000 Stück.

Im Jahrbuch des Allgemeinen Esperantobundes ist auf Grund unserer Initiative wieder eine ganzseitige **Werbeanzeige** der Deutschen Bundesbahn erschienen.

Die Eisenbahner-Arbeitsgemeinschaft „Esperanto-Filmo-Germanujo“ brachte ihre 4. esperantosprachige **Philips-Schallplatte** heraus unter dem Titel „Erinnerungen an Brüssel“. Auf ihr sind Chöre zu hören, die im Esperanto-Weltkongreß Brüssel gesungen wurden: Melodien aus „Walzertraum“ und „Lustige Witwe“ und je ein italienisches und südafrikanisches Volkslied. Diese Langspielplatten sind zu haben bei der Limburger Vereinsdruckerei (Limburg/Lahn) oder Koll. Bier-nath, MA Braunschweig, Basa 949/866/1153.

Auch die Arbeit am Fachwörterbuch geht laufend weiter. Das Ziel ist, für die in dem bekannten Wörterbuch des Internationalen Eisenbahn-Verbandes (UIC) enthaltenen 8000 Wörter eine Esperanto-Übersetzung zu schaffen.

Der Jahresbericht enthält am Schluß die Feststellung, daß Esperanto zweifellos Kontakte und Erfahrungen ermöglicht, die Nichtesperantisten nicht zugänglich sind.

en Heidelberg la 14an kaj 15an de oktobro sukcesis ĉe la ekzamenkomisio Wiesbaden en la „Kapableco-ekzameno“ s-anino Margareta Kammerer, Regensburg, s-anoj Hans Höhn, Frankfurt/M. kaj Bruno Schwarzer, Elze (Han.).

Kurt Schönrich, komisionestro

Bekanntmachung

Die Gruppe Frankfurt a. M. trifft sich ab sofort einmal im Monat zu einem festliegenden Zeitpunkt, und zwar an jedem ersten Mittwoch jeden Monats von 16.30 bis 18.00 Uhr im sog. Denis-Saal der Bundesbahn-Betriebsküche des Hauptbahnhofes Frankfurt a. M., Stuttgarter Straße.

Ni deziras al ĉiuj en- kaj eksterlandaj geamikoj

GAJAN KRISTNASKON kaj FELIĀN NOVJARON!

GEFA-estraro

Redakcio: Gerhard Korth, Mainz, Josefsstr. 8. Deĵoradreso: BOI Korth, BUVB Rentenstelle Frankfurt (Main), Kaiserstr. 48 — telefono 955/1164. Manuskriptojn bv. skribi per skribmaŝino (nur sur unu pago de la folio, distanco inter la linioj estu 1½). Al tradukaĵoj nepre aldonu la originalan tekston. Sendlimo 15. I., III. V., VIII., X.

Preso: Limburger Vereinsdruckerei Limburg/Lahn